



ESPERO KATOLIKA

(monata revuo fondita en 1903)

JARKOLEKTO 68 n. 618

ESPERO KATOLIKA

Oficiala organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)

Redaktoro: **Vakas**

Respondeca Komisiono: Longoni, Flammer, Scherer

Provizora Redaktejo: ĉe la Prezidanto de IKUE

Eldonejo: Fiamma del S. Cuore - Vicolo S. Antonio 2 - I - 10023 CHIERI (TO)
Tel. 942758 - c.c.p. 2/837

Estraro de IKUE:

Prezidanto: pastro Ferdinando Longoni
via S. Ambrogio, 2 - I-20051 Limbiate (MI) - Italujo

Vic-Prezidanto: Sin.ro N. W. Vigar
28 Franklands Drive - Addlestone - Surrey - Anglujo

Sekretario-kasisto: sin.ro Paul Scherer-Graber
Erlenstr. 58 - CH 6020 Emmenbrücke (LU) - Svislando

Vic-Sekretario: pastro Wilhelm Flammer
Zürchersnühle - CH 9106 Urnäsch. - Svislando

Konsilantaranoj:

pastro A. Beckers - Kwaadmechelen - Belgujo
patro Lovro Kiš, ofm, Ŝetalište 2 - 56236 ILOK - Jugoslavio
sin. Walter Mudrak, Beatrixgasse 19/9 - A-1030 WIEN - Aŭstrujo
f.ino prof.ino Corry van Kleef - Koewijzend 28, BLOKKER - Nederlando
sin. Miloslav Švâček - Penčice 16, okr. Pĕřerov - Ĉeĥoslovakujo
sin.ro Aleš Berka - Na harazi 1423 Vsetín - Ĉeĥoslovakujo
patro Manuel Casanoves, Lauria 5 - Barcelona 10 - Hispanujo

Centra Oficejo kaj Arkivo: ĉe la Vic-Sekretario, Flammer

Rajtigo de la tribunalo de Milano n. 208 (27 majo 1971)

Respondeca direktoro: Longoni Ferdinando
Via s. Ambrogio 2 - Tel. 9960050 - I - 20051 Limbiate (MI)

Presejo: Soc. Tipo-litografica G. e M. Bigliardi - Via Tana 18 - I - 10023 Chieri (TO)

Ekspedo per poŝtabono - Gr. III/70 - Supplemento al n. 7 de « Lungo la via »

LA KRIZO DE LA AMO

Paroli pri la amo estas tro facile.

Ankaŭ en esperantujo estas facile, kaj kutime paroli pri la amaj interrilatoj.

La internacia lingvo mem estas tre bona ilo por interkompreno, por niaj amaj celoj.

1. - Tamen: « se mi parolus ĉiun lingvon, kio estas en la mondo, kaj la lingvon mem de anĝeloj, ne havante amon, kion ĉi ĉio min helpus?

Se mi scius parkere la tutan Bibliion, kaj la sentencojn de ĉiuj filozofoj, kion ĉi ĉio utilis, sen la amo al Dio, kaj al la fratoj? Sen amo, ago ekstera donas nenian profiton; sed kio estas farata pro amo, kiel ajn malgranda kaj malestimata ĝi estu, fariĝas tre fruktodona.

Dio ja taksas pli la kialon de ies ago ol la agon, kiun faras.

2. - Tamen, ofte, io ŝajnas esti amo, sed ĝi estas pli voluptamo: ĉar karna inklino, propra volo, espero pri rekompenco, komfortamo malofte volas forresti.

Kiu havas veran, kaj perfektan amon, en nenia afero serĉas sin mem; sed nur deziras, ke en ĉio la gloro de Dio efektiviĝu.

3. - La amo estas rapida, sincera, pia, ĝojiga kaj agrabla, forta, pacienca, fidela, prudenta, tolerema, kuraĝa, kaj neniam serĉas sin mem; ĉar kie iu serĉas sin mem, tie li malfideliĝas de la amo. La amo estas singarda, humila kaj justa, ne molanima, ne facilanima, ne serĉas vantaĵojn; ĝi estas sobra, ĉasta, konstanta, trankvila, kaj singarda pri ĉiuj siaj sentorganoj.

La amo estas submetita kaj obeema al superuloj; antaŭ si mem, senvalora kaj malestiminda; je Dio, pia kaj dankema: ĉiam ĝi fidas kaj esperas al Li, ankaŭ kiam ĝi ne gustumas Dion; ĉar sen doloro oni ne vivas en amo.

4. - Ne estas io granda, interrilati kun homoj bonaj, kaj dolĉanimaj: ĉar ĉi tio ja denature plaĉas al ĉiuj; kaj ĉiu volo, tie ĝuas pacon, kaj amas pleje tiujn, kiuj kun li simpatias.

Sed kun personoj maldelikataj kaj malvirtaj, aŭ maldisciplinaj, aŭ kiuj nin kontraŭas, vivi en paco estas granda graco, kaj tre laŭdinda kaj vira ago, kaj vere pruvo de amo.

Ĉu mi skribis ĉi tie novaĵojn? Tute ne.

Ni ĉiuj jam aŭskultis tiujn vortojn el la sankta Skribo, el la eklezia tradicio, el la ora libreto « La imitado de Kristo ».

Sed estas necese ofte pripensi por kontroli nian veran agadon.

F. L.

Ni preĝu laŭ la deziro de la Papo por la monato de Junio:

POR KE LA PENTA SAKRAMENTO ESTU RICEVATA

TRE ŜATATE KAJ KUN LA NECESAJ INKLINOJ

La S. Kongregacio por la disciplino de la Sakramentoj diskoniĝis dekretan pri Konfes-sakramento, la 8-an de decembro 1970 al la kompetentaj religiaj aŭtoritatoj; sed ĝin publikis nur en marto. Ĉi tiu dokumento celas pli larĝan konsciencliberon al gereliĝuloj, kiuj estas invitataj al ofta konfeso (almenaŭ dufoje pomonate) sed ne devige antaŭ la konfesprenanto ordinara aŭ eksterordinara, aprobita por la religia hejmo. Kiel antaŭe la superuloj devas provizi lin por la komuno, kies membroj tamen povas valide kaj lice konfesi ĉe iu ajn sacerdote aprobita en la diocezo.

Ĉi tiun liberecon ekde nun povas ĝui ankaŭ gereliĝuloj dediĉitaj al kontempla vivo, kiuj ne plu estos devigataj sin prezenti al konfesprenanto. Intenco de ĉi tiu deklaro estis forigi de la ĉiusemajna konfeso ĉe gereliĝuloj tiun rutinon, kiu malpliigas — ni ne volas dir — nuligas — la esencajn kondiĉojn de la konfeso: pentado kaj konverto; kaj redoni al la animoj la senton de la ne-nstataŭebla efiko de ĉi tiu sakramento por pli sankta vivo. Do, tute ne malplivalorigi la pentan sakramenton!

Kelkaj, soifantaj novaĵojn, kiuj proponas facilan, supraĵan, nur socian kristanisman, emus abolicii, se ne redukti ĝin draste. Oni

aŭdas, ĉe multaj kristanoj kaj — eĉ sacerdotoj, ke ne plu estas necese konfesi ofte; ke oni povas komunii sen neniu konfeso, krom ĉe okazo de gravaj kulpoj, ktp. Fakte, en kelkaj lokoj oni ne plu konfesas; kaj tio eĉ ne eblas, ĉar mankas konfesejoj kaj sacerdotoj emaj konfesricevi. Kion oni devas opinii pri tio? Ŝajnas al ni, ke ĉi tio estas la lasta eltrovaĵo de la homa malico, eĉ diabla sugesto por forigi de la homoj konsciencekzamenon kaj la dian admonon, kiuj baras vojon al peko, dum samtempe oni klopodas forpreni ĝuste tiun sakramenton, kiu resanigas vundojn kaj pliigas la gracon. Fakte, iuflanke la konscienco alkiutimiĝas al kulpoj; aliflanke, tiu, kiu sentas ankoraŭ riproĉon de la konscienco, kiel kuraĝos, celante konfeson, sin montri kulpa antaŭ ĉiuj? Fine, ankaŭ la komunio, kiu ĉiam invitis al la plej granda pureco de konscienco, perdos entute ĉi tiun postulon. Enfosante konfeson, la malamiko de la eklezio de Kristo, celas baldaŭ enfosi la plej grandan trezoron de l'Eklezio, eŭkaristion kaj komunion. Kio restus post tiaj detruoj? Ĉio falus.

Ankaŭ la konfessakramento, kiel la aliaj, estos reformita. Oni diras, ke ĝi aspektas pli ol antaŭe postrestinta. Parte pro teologia motivo, ĉar oni ĉiam malpli atentis Dion kaj pekon: se Dio kaj

peko ne plu maltrankviligas la konsciencojn, pri kio oni konfesu? Parte pro evoluo de la homa konscienco el individua al socia vivo. Kelkaj intertempe senpacience jam enkondukis novajn eksperimentojn, opiniante, ke la pentofara agado, per kiu komenĝas la meso, anstataŭos la konfeson antaŭ la komunio. Sed oni devas agnoski, ke neniam, en la historio de la eklezio, ĝi havis sakramentan efikon, kvankam la

eklezio rajtas tion fari. Multaj do proponis, ke la eklezio forstreu la devon konfesi antaŭ la komunio kaj donu absolvan efikon al la penta agado de la meso. Kiel ajn, restus tamen la devon konfesi la gravajn pekojn post la komunio, en oportuna okazo. Sed kiam kaj kian reformon de la konfeso donos al ni la eklezio, hodiaŭ estas malfacile diri.

el « Katolika Sento »

Ruslando

Tre ŝatata la porpaca, kaj porjusteca agado de Paŭlo VI.

Signifoplena artikolo en ateista revuo.

La rusa verkisto I. Davidov verkis artikolon pri la vojaĝo de la Papo tra la Orientaj landoj. Atmosfero de tiu artikolo estas pli serena, kaj objektiva ol kutime.

La verkisto analizas la emojn de Iohano XXIII, kaj de Paŭlo VI, tamen li ne kontraŭstarigas ilin reciproke; li klarigas, kiu estas, laŭ sia opinio, progresema, kiu konservema.

Ĉiu Papo, en la eklezia historio, agas laŭ sia persona naturo, laŭ la ĉirkaŭaĵoj, ĉiam evoluantaj, kaj neniam revenantaĵ.

La rusa revuo « Scienco, kaj religio » daŭrigas sian artikolon, juĝante Paŭlon VI reformaciisto, daŭriganta la agadon de Johano XXIII. Tiuj Papoj rompis la malliberecon de Papoj starintaj sur la Vatikana roko, kaj forvojaĝis tra la tuta mondo; ili interesiĝis ne nur pri la ekleziaj aferoj sed ankaŭ pri la tutmondaj problemoj. Paŭlo VI bone komprenis, ke la estonto de la homaro sidas en la tiel dirita « Tria Mondo », la mondo de la evoluantaj popoloj, kiujn Eklezio devas helpi.

Dum sia vojaĝo la Papo klopodis marŝi renkonte al la popolo, al la homoj « malgrandaj » (la ateista revuo preferis uzi tiun evangelian vorton): li ne vojaĝis sub la protekto de granduloj.

Nuntempe la tuta eklezia agado estas juĝata pli bone ol antaŭe. La Kremolino atentigas al la realeco de la papa aktiveco. Oni rimarkis la emojn de la Vatikano je la orientaj nacioj.

Paŭlo VI al la junularo partoprenanta en la internacia marŝo por la evoluo.

SIGNO DE NOVA KONSCIO MATURIGANTA EN LA MONDO

Estas tiu de la unuiĝo de la homaro, tiu de le solidareco inter la popoloj de la tero, tiu de la ne plu tolerebla malegaleco inter nacioj evoluintaj kaj nacioj survoje al malfacila evoluo.

Dekmiloj da gejunuloj partoprenantaj en la internacia marŝo por la evoluo organizita de la movado « etenditaj manoj » amasiĝis, dimanĉon, la naŭan de majo, en la placo S. Petro kiam la Sankta Patro, je la 12, montriĝis, kiel kutime, el la fenestro de sia privata studocambro por reciti la Mari-preĝon kune kun la fideluloj. Antaŭ « Regina Coeli », Paŭlo VI alparolis la ĉeestantojn per tiuj ĉi vortoj:

Nia fenestro malfermiĝas hodiaŭ ne super senmova popolamaso sed super longa kaj densa sekvantaro en movo. Kiuj vi estas, geamikoj? kaj de kie vi venas kaj kien vi iras? Kia estas la motivo de la pacifika sed fervora marŝo? Vi sciigis nin, ke vi estas civitanoj el ĉiu progresinta lando, el ĉiu lingvo, ĉiu aĝo, ĉiu tendenco; vi apartenas al la movado tiel dirita de la « etenditaj manoj », t. e. iniciatoroj pri « internacia informa kampanjo, por

naskigi decidan strebon favore al la Landoj survoje al evoluo ».

Ni vidas viajn kvindek flagojn, kiuj demonstros kiel ankaŭ en aliaj urboj de la mondo samtempe okazas via konkorda kaj publika manifestacio; 650 marŝoj, oni diras al ni, disvolviĝas en multaj aliaj Landoj. Ni admiras ĉi tiun eventon. Ĉi estas elokventa signo de nova konscio kiu maturiĝas en la mondo, tiu de la unuiĝo de la homaro, tiu de la solidareco inter la Popoloj de la tero, tiu de la ne plu tolerebla malegaleco inter nacioj evoluintaj kaj nacioj survoje al malfacila evoluo; tiu, fine, de la homa kaj kristana neceso, ke al la etenditaj manoj de ĉi tiuj Nacioj bezonantaj fratan helpon respondu la etenditaj manoj de tiuj Nacioj kiuj, per malavara kaj malprofitema amo, povas tian helpon doni.

Vi venas el la profundoj jam malfermitaj de ĉi tiu moderna konscio, kaj vi iras laŭ la postuloj ne malpli malfermitaj kaj profundaj de la homaro. Ĝi mem konscia, ke ia supera internacia justeco devas akiri per civila sa-

ĝeco kaj spontanea amo tion, kio necesas al la novaj naciaj komunumoj por ilia liberiĝo el la neceso kaj por ilia leviĝo al la nivelo de la komuna progreso.

Tio ĉi, simpla kaj klara por la junularo profetanta la estontecon, estas malfacile plenumbla, ĉar ĝi postulas rimarkindan sinoferon flanke de kiuj posedas.

Ni ankaŭ, kun aliaj pli kompetentaj kaj potencaj ol ni, ekde kelka jaro tion ripetadas kaj plue rediros, donante ni mem, kvankam sen gravaj ekonomiaj rimedoj, kelkan simbolan kaj efektivan ekzemplon.

Sed la Eklezio, ne de hodiaŭ, donas pli; ĝi donas la vivon, la tutan vivon de siaj Misiistoj; kaj pro tio ne povas resti sensenta je via mirinda iniciato.

Ni kore salutas vin, filoj kaj fratoj karegaj, pilgrimantoj tra ĉi tiu Romo, kor-urbo de la tiel dirita okcidenta civilizo, kaj tra tiom da aliaj urboj florantaj je progreso kaj bonstato sur la tuta tero. Ni salutas kaj admiras vin, precipe vin, junuloj, kiuj per nova spirita strategio preferas la proponon ol la proteston; la proponon pozitivan, konstruan kaj altruisman ol proteston negativan, kontestan, dekadencan kaj egoisman; ni salutas kaj kuraĝigas vin ĉiujn, precipe vin homoj bonstataj kaj regantaj la sorton de la popoloj, plani kaj entrepreni konsistan kaj daŭran helpagadon por la Landoj de la « tria mondo »; kaj elkore ĉiujn en la nomo de Kristo ni benas vin.

EKUMENA KUNVENO EN GERMANUJO

Tre grava estis la kunveno okazinta la 5-an de Junio en Aŭgusto, (Germanujo) inter katolikoj kaj protestantoj. Kvin mil personoj partoprenis la diservon, kiun celebris la reformita episkopo Dietzfelbinger kaj la katolika kardinalo Doepfner. La kunvena celo estis konstati le realajn kontaktpunktojn indikantaj efektivan reapudiĝon inter la Eklezioj.

Signifoplena estis la elekto de kunvena urbo. En Aŭgusto, fakte, dum la jaro 1530.a, la luteranoj prezentis sian kredokonfeson, verkita de Melanktono, poste nomita « Aŭgusta kredokonfeso ».

Per tiu kredokonfeso rompiĝis la eklezia komuno de Kristanoj.

DU KALVINISTAJ EKLEZIOJ UNUIĜAS

Kontraŭ la kutima plidisiĝo, du anglaj Eklezioj, el komuna kalvinista deveno, kongregacionistoj kaj presbiterianoj decidis unuiĝi kaj sekve nomiĝi: Eklezio reformita unuiĝita. Tiu unuiĝo fariĝis laŭ la doktrina kaj la administracia flanko.

INTERVJUO KUN KARDINALO WILLEBRANDS PRI LA RILATOJ INTER LA RUSA ORTODOKSA KAJ LA KATOLIKA EKLEZIO

En la antikva monaĥejo de Zagorsko stariĝis nacia koncilo de rusa ortodoksa eklezio en la tagoj de la 30.a de marto ĝis la 3.a de junio. Oni elektis metropoliton Pimen nova patriarko de Moskvo.

Tiun koncilon partoprenis, kiel simpla observantulo, kardinalo Willebrands. Ni scias, ke ankaŭ du reprezentantoj de Moskvo, partoprenis, kiel aŭdantoj, la duan Vatikanan Koncilon.

Ni faris al sin.ro Kardinalo Willebrands demandojn, ni petis al li informojn pri tiu ortodoksa koncilo.

1) **Kia estas nun la situacio de rilatoj inter la katolika, kaj la rusa ortodoksa eklezio?**

R.) Multajn jarojn ni vivis en reciproka ignoro; aŭ en miskomprenoj, eĉ en atakoj kaj anatemoj. Post la dua Vatikana Koncilo la afero tute ŝanĝis. Oni alproksimiĝis reciproke, kaj oni klopodis starigi kunulecon preskaŭ plenan; pri kiu la Papo mem jam parolis, kaj skribis al la patriarko Atenagoro. Oftaj reciprokaj vizitoj estas ekstere signo de interna amikeco.

2) **Pri kiuj argumentoj estas pli vigla la dialogo?**

R.) Dum la lastaj kunvenoj en la itala urbo Bari, (Bari estas tre akceptinda al la ortodoksoj, ĉar tie kuŝas la relikvoj de S. Nikolo) faritaj dum la jaroj 1967-1970, oni pristudis kune la socian katolikan doktrinon. Poste, temis pri la rolo de kristanoj en la evoluanta societo, nome:

- a) ĉu asketismo kristano povas servi al la moderna mondo
- b) kiel povas la homo kunlabori al la kreanta ago de Dio
- c) kiuj rilatoj estas eblaj inter la ekleziai komunumoj kaj la granda homa familio
- d) kiujn rilatojn ni povas stariĝi inter kristanoj, kaj nekredantoj.

Tiuj kunvenoj estis ĉiam plenaj je vera frata spirito, kaj komuna preĝado.

3) **Kion vi jam atingis, kaj, kion vi esperas plifacile atingebla en la estonteco?**

R.) La plej grava frukto ĝis nun akirita estas ĵuste la nova klimato de komuna vivo, de kreskanta kunuleco.

Aliaj fruktoj estas jenaj:

- oni rekonis, reciproke, la validecon, kaj la licecon de geedziĝo inter katolikoj kaj ortodoksoj;
- estas permesata la interkomunio, ĉu por la Eŭkaristio, ĉu por la Pentofara sakramento, ĉu por la sanktoleado al la malsanuloj, se ĉeestas ĵustaj kondicoj;
- la metropolito de Leningrado kaj Novgorodo, Nikodim, estas la oficiala peranto de rusa ortodoksa eklezio en ekumenaj rilatoj. Li ofte venis al Romo por plibonigi niajn rilatojn.

Ankaŭ la rusa ortodoksa eklezio nuligis reciprokajn ekskomunikojn.

Ĉi tie ni aldonas folion, enhavanta la ordinaran parton de ĉiu Meso, por la Asembleo. En venonta numero ni eldonos la ordinaran parton de celebranto. Bv. elĉerpi kaj konservi, por niaj kunvenoj.

ORDINARA PARTO DE LA MESO

Komunaj preĝoj de la Asembleo

A = Asembleo	(st) = starante	(1) (2) (3)	k.t.p. estas propraj partoj de ĉiu Meso, kiuj troviĝas en la meslibro. (V. ĉ. ml. Vidu ĉe meslibro)
C = Celebranto	(s) = sidante		
L = Lektoro (aŭ diakono)	(g) = genue		

PREPARAJ PREĜOJ

Dum la alveno de la sacerdoto(j) al la altaro, oni diras, aŭ kantas, la

(1) ENIRAN KANTON (V. ĉ. ml)

(st) C. *En la nomo de l' Patro, kaj de l' Filo, kaj de l' Sankta Spirito.*

A. Amen

C. *La graco de nia Sinjoro Jesuo Kristo, la amo de Dio Patro, kaj la komuniko de la Sankta Spirito estu kun vi.*

aŭ (laŭvole)

C. *La Sinjoro estu kun vi.*

A. Kaj kun via spirito

Konfeso de pekoj

C. *Fratoj, ni konfesu niajn pekojn, antaŭ ol ni celebros la sanktajn misterojn.*

(silenta konscienc-ekzameno)

(unua formulo)

C. *Vi, kiu estas sendita por resanigi la pentantojn; Sinjoro, kompatu.*

A. Sinjoro, kompatu.

C. *Vi, kiu venis por revoki la pekulojn; Kristo, kompatu.*

A. Kristo, kompatu.

C. *Vi, kiu sidas ĉe la dekstro de la Patro, propetante por ni; Sinjoro, kompatu.*

A. Sinjoro, kompatu.

(dua formulo, laŭvole, anstataŭ la unua)

A. *Mi konfesas al Dio ĉiopova, kaj al vi, fratoj, ke mi multe pekis per penso, parolo, faro, kaj forgeso; (batante sian bruston unufoje) pro mia kulpo, pro mia kulpo, pro mia plej granda kulpo.*

Mi petas beatan Marian ĉiam Virgan, la Anĝelojn, la sanktulojn, kaj vin, fratoj, preĝi por mi al Sinjoro, nia Dio.

C. *Kompatu nin la ĉiopova Dio, kaj pardoninte niajn pekojn, li gvidu nin al la eterna vivo.*

A. Amen.

C. *Kyrie elejson*

C. *Christe elejson*

C. *Kyrie elejson*

A. *Kyrie elejson*

A. *Christe elejson*

A. *Kyrie elejson*

C. *Gloro al Dio en la alto*

A. Kaj sur la tero paco al la homoj de lia favoro.
Ni laŭdas vin. Ni benas vin. Ni adoras vin. Dankon ni diras al vi,
pro via granda gloro.

Sinjoro Dio, ĉiela reĝo, Dio Patro ĉiopova.

Sinjoro Filo unugenerata, Jesu Kristo.

Sinjoro Dio, ŝafido de Dio, Filo de l' Patro, kiu forprenas la
pekojn de l' mondo, kompatu nin.

Kiu forprenas la pekojn de l' mondo, akceptu nian petegon.

Kiu sidas ĉe la dekstro de la Patro, kompatu nin.

Ĉar vi sola estas sankta, vi sola la Sinjoro, vi sola la Plejaltulo,
Jesuo Kristo, kun la Sankta Spirito en gloro de Dio, la Patro.

C. *Ni preĝu... (silenta preĝo)*

(2) **PREĜO (V. ĉ. ml)**... *en jarcentoj de jarcentoj.*

A. Amen.

(s) **LITURGIO DE LA DIA VORTO**

L. **(legas perikopon el la malnova Testamento)** (3) **(V. ĉ. ml)**

L. *... Parolo de Dio.*

A. Al Dio estu danko.

(4) **GRADUALA KANTO (V. ĉ. ml)**

L. **(legas epistolon de S. Paŭlo)** (5) **(V. ĉ. ml)**

L. *... Parolo de Dio.*

A. Al Dio estu danko.

(6) **ALLELUJA KANTO (V. ĉ. ml)**

(st)

L. *La Sinjoro estu kun vi*

A. Kaj kun via spirito

L. *La sankta Evangelio de Jesuo Kristo laŭ Mateo (aŭ Marko, Luko,
Johano)*

A. Gloro estu al vi, Sinjoro

(7) **(V. ĉ. ml)**

L. *Parolo de la Sinjoro*

A. Al Kristo estu laŭdo.

(s)

HOMILIO

(st)

C. *Mi kredas en unu Dio*

A. La Patro ĉiopova, kreanto de l' ĉielo kaj de la tero, de ĉiuj aĵoj,
videblaj kaj nevideblaj.

Kaj en unu Sinjoro Jesuo Kristo, unugenerata Filo de Dio, kaj
el la Patro generata antaŭ ĉiuj jarcentoj.

Dio de Dio, Lumo de Lumo, vera Dio de vera Dio, generata, ne
farita, samsubstanca kun la Patro kaj per kiu ĉio estas farita.

Por ni homoj, kaj por nia savo, li malsupreniris el la ĉielo.

Kaj per la Sankta Spirito li enkarniĝis el Maria, la Virgulino,
kaj fariĝis homo.

Li estis krucumita por ni sub Poncjo Pilato, mortis kaj estis
entombigita.

Kaj la trian tagon li leviĝis laŭ la Skriboj; kaj supreniris en la ĉielon, kaj sidas ĉe la dekstro de la Patro.

Kun gloro li revenos, por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn. Kaj lia regno estas senfina.

Mi kredas en la sankta Spirito, la Sinjoro kaj Viviganto, kiu devenas de la Patro kaj de la Filo; kiu kun la Patro kaj la Filo estas adorata kaj glorata; kiu parolis per la profetoj.

Kaj en la unu, sankta, katolika kaj apostola Eklezio. Mi konfesas unu bapton, por la pardono de la pekoj.

Kaj mi atendas la leviĝon de la mortintoj kaj la vivon de la venontaj jarcentoj. Amen.

PORPETAJ PREĜOJ

- L. *Por, ke..., ni preĝu.*
- A. Sinjoro, elaŭdu nin.
(same, ĝis la fino de preĝoj)
- C. (konkludas)
- A. Amen.

EŬKARISTIA LITURGIO (ofero, konsekro, komunio)

(8) OFERA KANTO (V. ĉ. ml)

(s)

- C. *Estu benata, ho Dio de l'universo, ĉar ni ricevis panon, kiun ni oferas al vi, el frukto de la tero kaj el homa laboro; ĝi fariĝos por ni pano de eterna vivo*
- A. Estu Dio eterne benata
- C. *Estu benata, ho Dio de l'universo, ĉar el via boneco ni ricevis la vinon, kiun ni oferas al vi, el frukto de vito kaj el homa laboro; ĝi fariĝos por ni sava trinkaĵo.*
- A. Estu Dio eterne benata
- C. *Preĝu, fratoj, ke mia kaj via ofero estu akceptinda ĉe Dio, la ĉiopova Patro.*
- A. La Sinjoro akceptu la oferon el viaj manoj; je laŭdo kaj gloro de sia nomo, kaj ankaŭ por nia prospero, kaj de sia tuta sankta Eklezio.

(9) FINA OFERPREĜO (V. ĉ. ml)

(st)

- C. *La Sinjoro estu kun vi.*
- A. Kaj kun via spirito.
- C. *Supren la korojn.*
- A. Ni havas ilin ĉe la Sinjoro.
- C. *Ni danku la Sinjoron, nian Dion.*
- A. Tio estas inda kaj justa.

C. (10) PREFACO (V. ĉ. ml)

- A. Sankta, sankta, sankta estas la Sinjoro, Dio de la legiaroj. Plenaj estas la ĉielo kaj la tero de via gloro. Hosana en la alto.
Benata estu, kiu venas en la nomo de l' Sinjoro. Hosana en la alto.

(g)

- C. (daŭrigas la konsekran preĝon. Post la konsekraj vortoj, li diras:)

C. *Mistero de la kredo!*

A. Ni anoncas vian morton, kaj konfesas vian reviviĝon, Sinjoro, ĝis kiam vi revenos.

(la konsekraj preĝoj finiĝas per la jenaj vortoj:)

C. ... *dum ĉiuj jarcentoj de jarcentoj.*

A. Amen.

(st)

C. *Admonitaj per savaj ordonoj kaj formitaj per Dia instruo, ni kuraĝas diri:*

A. PATRO NIA, kiu estas en la ĉielo, sanktigata estu via Nomo; venu via Regno, fariĝu via Volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ. Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj. Kaj ne konduku nin en tenton; sed liberigu nin de la malbono.

C. ... *kiuj sopiratendas la alvenon de Jesuo Kristo, nia Sinjoro.*

A. Ĉar eternan reĝecon, potencon, kaj gloron vi posedas.

C. ... *kaj regas en jarcentoj de jarcentoj.*

A. Amen.

C. *La paco de l' Sinjoro ĉiam estu kun vi.*

A. Kaj kun via spirito.

C. *Reciproku inter vi pacsignon.*

(dum la frakciigo de konsekrata pano)

A. Ŝafido de Dio, kiu forprenas la pekojn de l' mondo, kompatu nin.
Ŝafido de Dio, kiu forprenas la pekojn de l' mondo, kompatu nin.
Ŝafido de Dio, kiu forprenas la pekojn de l' mondo, donu al ni la pacon.

C. *Beataj la alvokitoj al la festeno de la Ŝafido.*

Jen la Ŝafido de Dio, kiu forprenas la pekojn de l' mondo.

A. Sinjoro, mi ne estas inda partopreni vian festenon; sed diru nur vorton, kaj mi saniĝos.

(11) KOMUNIA KANTO (V.ĉ. ml)

C. *La korpo de Kristo.*

(ĉiu komunianto respondas, siafoje) Amen.

C. *Ni preĝu. (silenta dankpreĝo)*

(12) POSTKOMUNIA PREĜO (V.ĉ. ml)

A. Amen.

FINA RITO

C. *La Sinjoro estu kun vi.*

A. Kaj kun via spirito.

(se la Celebranto estas episkopo)

C. *La nomo de Dio estu benata*

A. Nun kaj eterne

C. *Nia helpo estas en la nomo de l' Sinjoro*

A. Kiu faris la ĉielon kaj la teron.

C. *Benu vin la ĉiopova Dio, la Patro, kaj la Filo, kaj la Sankta Spirito.*

A. Amen.

L. *La meso finiĝis. Nun foriru en paco.*

A. Al Dio estu danko.

4) **Kiuj estas la eblecoj de rusa Eklezio, vivanta sub la premado de ateista registaro?**

R.) Nikodim bone deklaris en Bari, ke la rusaj kristanoj povas ĉiam agi kontraŭ la peko (ĉu privata, ĉu publika) ili povas kontribui al la starigo de homa kaj socia justeco, helpante la evoluadon de popoloj.

La plej granda zorgo de niaj rusaj fratoj estos ĉiam jena: kiel mi povos resti fidela al la principoj de kristana kredo, kaj lojale kunlabori kun alioj, kiuj ne havas mian kristanan vidpunkton pri la mondaj problemoj? Kiu konas la kompleksan kaj malfacilan situacion de tiuj landoj, tiu povas kompreni, ke tiu celo estas granda.

5) **Vi konas la teologiajn kaj la asketikajn tradiciojn de rusoj. Kiuj el ili povas interesigi la katolikojn?**

R.) Unue la rolo de la liturgio en la konservado kaj la disvastigado de la kredo. La liturgio estas fakte la plej bona instruisto pri la religio; la partopreno de fideluloj al la liturgio estas la plej bona edukado de ilia kristana karaktero. Tiamaniere ankaŭ ni komprenas, kiel povis esti konservata ĝis nun la kredo.

Due: ili sentas profunde la reviviĝon de Kristo, nia espero. Ili kredas precipe al la agado de la Sankta Spirito en ĉiu kristano, kaj en la tuta Eklezio.

Tiuj aspektoj de ilia kredo estas tre gravaj ankaŭ por ni, katolokoj, en nia erao, kiu deziras laikigi la kredon, kaj sekularigi la religion kiel nur socia afero.

BONE EVOLUAS LA RILATOJ INTER LA POLA EKLEZIO KAJ LA POLA REGISTARO.

(el la ĵurnalo katolika "Słowo Powszechne")

La 23.an kaj 24.an de Junio okazis la 126.a plena kunveno de la pola episkoparo en Woscikow-Paradyz. Oni atente konsideris la apartajn situaciojn de polaj regionoj en la okcidenta, kaj norda parto de Polujo, post la fikso de novaj landlimoj. Tiuj regionoj estas unuigitaj al la komuna patrujo sed oni devas uŝuigi ankaŭ la animojn.

Treplezure la episkoparo akceptis la leĝon de la pola registaro kiu donis ankoraŭ al la Eklezio kaj al la monaĥejoj rajton posedi preĝejojn kaj aliajn ekleziajn ejojn, kiujn jam ili uzis, kaj donacas aliajn posedaĵojn, necesaj por la apostola agado de Eklezio. Tio signifas favoran antaŭenmarŝon de evoluantaj rilatoj inter la Eklezio kaj la Ŝtato.

Pri la rezultoj de la pola episkopa konferenco (okazinta la 7.an de Junio en Varsovio) raportis la kardinalo Wiszynski. Ankoraŭ temas pri la rilatoj eklezia-politikaj. La evoluo de tiuj aferoj estas espero-plena. Delegitoj de la episkoparo interkunvenis kun la registarano Wincenty Krasko; kaj ili profunde sentas, ke la plej altaj ŝtataj aŭtoritatoj estas bone favoraj je la katolikaj problemoj.

Pastro Bronislaw Dabrowski raportis pri sia vojaĝo al Romo, kaj pri la aŭdienco ĉe la kardinalo Ŝtata Sekretario.

Oni preparas tre fervore la trian diocezan sinodon de Varsovio.

NI GRATULAS

al Irma Indinger kaj D-ro Klaus Perko pro ilia geedziĝo la 5-an de junio 1971. Ilia adreso estas: Lendkai 111, Graz, Aŭstrujo. Ni deziras al la juna paro Dian benon kaj multan feliĉon.

el "Dia Regno"

Rumanujo:

ESPERANTO EN PREĜEJO

En la unua tago de Pasko (18 aprilo 1971) en la Bucureŝta Ĉefkatedralo, laŭ kutimo, dum la tagmeza Diservo, oni legis la Evangelion en 12 lingvoj. Dek du pastroj frunte kun la Ĉefepiskopo, Patriarko Justinian, ĉiu laŭ sia vico legis la koncernan Evangelion (Joh. 20 : 19-29) en alia fremda lingvo, t.e. unue la rumana, greka, latina, hebrea, slavona,

rusa, franca, germana, angla, esperanta kaj denove en la rumana. Sacerdoto Stefan Mazare, jam tria jaro, legis ĝin en Esperanto. La katedralo estis tiel superplena de homoj, ke eĉ en la korto de la preĝejo kie pendis megafonoj, grandamaso da kredantoj aŭskultis la sanktan Diservon.

Je tiu okazo, ĉeestantoj sciigis ke ekzistas Esperanto kaj ke oni uzas ĝin en la disvastigo de la Evangelia vorto. Multaj homoj esprimis admiron pri la belsona Esperanto kaj petis informojn pri ebleco eklerni ĝin.

Prof. N. Bulenĉea

EL NACIAJ ASOCIOJ: FILOJ DE IKUE.

La bultenon de Hispanaj Katol. Esp.oj ni ricevis (N. 53) kaj treĝoje ni legas sian enhavon.

La precipa artikolo de la Prezidanto (D. Fernando De la Puente Solsona) pritraktas la novaĵojn en la estraro de Ikue, kaj en la redakcio de E.K., kaj, konsekvence, programas la sintenon de hispanaj katolikoj esperantistaj, post tiuj ŝanĝoj. Li ankaŭ sugestas al nova redaktoro kiel gvidi la revuon laŭ la direkto katolika, laŭ la post-koncilaj sugestoj, laŭ vera ekumena spirito je niaj fratoj de KELI. Ili gratulas ĝoie novan hispanan estraron de IKUE, patron Casanoves.

Li bondeziras al ĉiuj, ke forgesinte la malnovan rompadon kaj ĝiajn kialojn, la hispanoj revenu ĉiuj en la karan mondan asocion de katolikaj esper.oj.

El la protokolo de la ĝenerala kunveno de KEHA en Saragozo, okazinta la 14-an de marto, ni ekkonas ke la oficiala hispana asocio de esper.aj katolikoj decidis oficiale reveni en IKUE kaj, por tio, elektis oficialaj reprezentantoj de KEHA ĉe la IKUE Lian Moŝton S.on. D. Miguel Sancho Izquierdo kaj la Prezidanton mem de KEHA, s.ron D. Fernando De La Puente Solsona.

En Alikanto okazos la nacia kongreso de hispanaj esper.oj. La katolikoj estas invitataj partopreni ĉar ne estas eble starigi apartan kongreson.

POST 8 JAROJ PAPO JOHANO XXIII VIVAS ANKORAŬ

Antaŭ malmultaj semajnoj mi veturis al Konstanzo kaj tie vizitis la faman konstruaĵon de la Koncilo. Mi pensis tuj al la Papo, kiu kunvokis la koncilon antaŭ kvin jarcentoj: Papo Johano XXIII.

Tiam la kristanaro havis samtempe tri papojn. Papo Johano rimarkis tuj, ke li havis kontraŭ si mem multajn episkopojn kaj prelatojn kaj sekrete fuĝis. La imperiestro Sigismundo komandis, ke oni serĉu kaj reportu lin en Konstanzon. Sed tuj li devis eksiĝi kiel nelegitima papo. Ni konas alian papon Johanon: legitiman kaj sanktan papon, kiu kunvokis alian koncilon: la duan vatikanan koncilon. Ankaŭ li malaperis dum la koncilo: la morto rabis lin al la amo kaj estimo de la kristanaro kaj de la tuta mondo.

Ok jaroj estas multaj, precipe dum tiuj rapidemaj tempoj, sed post ok jaroj lia figuro vivas ankoraŭ en ni, vivas lia mesaĝo de boneco, de frateco, de interkompreno. Ni rememoras lian bonan kaj ridetantan vizaĝon, lian patran parolon. Malgraŭ la mallonga pontifikado li lasis profundan piedsignon sur la jarcenta vojo de la Eklezio kaj hodiaŭ oni parolas pri sanktuligo de tiu ĉi papo.



Bedaŭrinde tro ofte oni rememoras lin por kontraŭmeti al li lian antaŭulon kaj lian posteulon. Ĉiu homo — kaj ankaŭ la papoj estas homoj — havas sian karakteron kaj metodon. Ni devas diri, ke ankaŭ Pio XII estis grandega figuro. Kaj ankaŭ Paŭlo VI, kvankam la sufero kun kiu li sentas sian tre altan mision ne permesas al li la spontanecon de Papo Johano, estas tamen tre estiminda papo kaj ni dankas Dion tutkore. Sed ne malpliigante la figuron de tiuj du papoj oni altigas la moralan figuron de Johano XXIII, eĉ ĝi akiras pli grandan reliefon per la grandeco de la papoj, kiuj venis antaŭ kaj post li.

NI DANKAS LA NACIAJN ASOCIOJN KIUJ SENDAS AL NI SIAJN BULTENOJN KAJ INFORMILOJN..

NOME: LA FRANCAN, LA AŬSTRIAN, LA HISPANAN, LA ĈEĤOSLOVAKIAN, LA ITALAN.

ĈU ALIAJ NE HAVAS BULTENOJN? NI ATENDAS.

SURVOJE AL LA EKUMENA UNUIGO

La ekumena dialogo intencas, unue, akiri interkomprenon, ŝaton, respekton kaj reciprokan amon; por tio la dialogo volas agi je ĉiu nivelo: politika, socia, ekonomika, religia, instrua.

Inter ni la dialogo estas necesa ilo por niaj kunvenoj, por kristana atesto, ĉu en la penso ĉu en la agadvivo.

Tiu celo, por la reunuiĝo de kristanoj, estas celo de ĉiuj membroj de la Eklezio, **sed unue estas zorgo de episkopoj fariĝi gvidantoj de dialogo kaj de ekumena movado.**

Laŭ la direktoj de la Dua Vatikana Koncilo, la vojoj de la ekumena movado estas jenaj:

- a) La ekumena movado devas resti fidela je la vero, kion la Eklezio ricevis de la Apostoloj kaj de la tradicio de la Patroj, ĉiam samesprimante la kredon de la ĉiama katolika Eklezio, kaj, samtempe, celante akiri la plenton (« pleroma ») kiun la mistika korpo de nia Sinjoro devas akiri.
- b) La programoj kaj la iniciatoj de katolikoj marŝu kunigitaj kun iniciatoj de niaj disiĝitaj fratoj; ni ne metu barojn sur la vojo, kiun la Dia Providenco elektas; ni ne metu antaŭjuĝojn, kiuj sendube malhelpos la estontan agadon de la Sankta Spirito.

Esencaj elementoj de dialogo estas bonvolo kaj reciprokeco.

BONVOLO: ĉar ĉiu dialoganto estas preta korekti siajn vidpunktojn, eĉ sian vivmanieron, kiam ŝajnas al si, ke la vero kondukas al tiu punkto.

RECIPROKECO: dialoganto, fakte, aŭdas, kaj akceptas demandojn; estas disponebla kaj akceptas aliojn por realigi plibonon komunion, je la vivo, je la kristana agado, je la vidpunktoj.

(daŭrigota)

NI FUNEBRAS

Don Kasimiro Morcillo, ĉefepiskopo de Madrido, mortis la 30-an de majo. Li fariĝis esp.ta dum la jaroj de seminarioj studoj sed, poste, pro la multaj laboroj, li ne povis daŭrigi sian esper.an agon.

Sed li malfermis la Kongreson de IKUE en Saragozo (okazinta en la jaro 1956) per esperanta prelego kaj ĉiam tutkore subtenis la esper.an movadon.

ĈU VI BONORDE RICEVIS LA KAJERON DE APRILO-MAJO?

Mi estus vin dankonta se vi konatigus al mi pri tio.

Tiu kajero ne havas numerojn de paĝoj. Tiu estis mia kulpo.

Por bona jarkolekto estus pli bone, ke vi mem skribu malgrandajn numerojn piede de ĉiu paĝo, de la n.ro 57, ĝis 72. La junia kajero fakte komencas je la paĝo 73.

KIU ESTIS LA UNUA ESPERANTISTO EN HISPANUJO

Ne stas dubo pri la fakto ke la unua hispana esperantisto estis sinjoro Joaquin de Arce y Bodega en Madrido. Li estis ĉefa bibliotekisto en la Senato (hispanlingve: bibliotecario mayor). Lia nomo figuras en la Tutmonda Jarlibro Esperantista por 1906 kiel « profesoro » kaj loĝanta en Baja de San Vicente 60.

En la Historio de Esperanto de Privat oni diras ke la unuan lernolibron D-ro Zamenhof sendis al diversaj societoj, lingvistoj kaj aŭtoritatuloj el diversaj landoj.

Mi supozas ke sinjoro Arce ricevis la broŝuron de D-ro Zamenhof kiel estrarano de iu volapuka klubo. En Málaga estis vigla klubo volapukista al kiu apartenis kiel ano profesoro José Rodríguez Huertas samprovincano de sinjoro Arce.

Kiam sinjoro Arce atente tralegis la unuau lernolibron de D-ro Esperanto entuziasmiĝis tiamaniere ke li mem instigis s.ron Rodríguez Huertas skribi lernolibron por hispanoj, jam en la jaro 1890.

La volapukan klubon el Málaga entuziasme esperantiĝis laŭ konfeso de la aŭtoro mem en la antaŭparolo de « Gramática, ejercicios y diccionario de la lingvo internacional de Doktoro Esperanto » eldonita en Málaga, 1890, presejo Cebrián.

El la menciita antaŭparolo mi kopias kelkajn liniojn: « ...kiam ni renkontis tui-ĉi novan lingvon de bonegaj kondiĉoj de simpleco kaj kun plej bona ebleco de sukceso ol volapuk ni estis la unuaj por malhisi nian flagon kaj konvinke aliĝi sub la standardo de Esperanto kiu simbolas laŭ nia humila vidpunkto la plej rapida kaj sekura efektiviĝo de la progreso kia ni deziras ».

Estus tre interesa ke iun esperantisto el Madrido aŭ Málaga serĉus informojn pri ambaŭ pioniroj de Esperanto en nia lando.

La Hispana Societo por propagando de Esperanto estis fondita lauleĝo la 1-an de februaro, 1903^a por la arbara ingeniero Ricardo Codorniu.

M U Z E O

MALFACILAĴOJ EN LA EKUMENAJ AFEROJ: LA LINGVOJ.

Dum televida dissendo la RAI-TV (itala televida servo) parolis pri la Ekumena Konsilantaro de Eklezioj en Ĝenevo. Tio okazis dimanĉon, 13 de Junio 1971.

Pastoro Lukas Vischer indikis malafacilaĵojn kiuj kontraŭstaras al la ekumena celo, inter kiuj estas la diferentaj lingvoj.

D-ro Stanley Samartha ankaŭ parolis pri la interna vivo de tiu grava konsilantaro, kiun partoprenas pli ol 250 eklezioj.

Patro Georĝo Dunne (la sola katolika pastro en tiu kunsido) estas la reprezentanto de Vatikano.

Li parolis pri la plej urĝaj problemaj kiujn la konsilantaro klopodas solvi: ekzemple la malriĉeco, la milito. « Ni proponas solvon de tiuj problemoj per edukado de popoloj, per instruo de la monda opinio, kies frukto estos veraj agoj porpacaj, kaj porjustecaj ».

Ankaŭ la Franca Ligo de Katol. Esper.oj sendis al ni sian bultenon (n. 88), el kiu ni aperigas jenajn informojn:

FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-LIGO

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO (7-3-71)

La Prezidanto, S-ro Colas, malfermas la kunvenon je la 15.15. Ĉeestas: S-ro Colas, Despiney, F-to Marmou, S-ino Vincent. Petis senkulpigon: F-inoj Le Boëdec, Paulier, S-to Baudry, S-roj Barrier, Bessière, Ribot.

I - ANTAŬA PROTOKOLO

S-ino Vincent leĝas ĝin; la estraro unanime ĝin aprobas kaj gratulas s-ron Barrier pro lia modela laboro.

II - KONGRESO EN ORLÉANS

Post legado de letero de S-to Goudé, la programo estas jene modifita:

— sabaton, 27-an de marto, vespere: komuna vespero kun la kongreso de amikeco.

— dimanĉon, 28-an de marto:

9,30: ĝenerala kunveno (v. tagordon ĉi sube)

11,30 aŭ 11,45: tagmanĝo

14,00: Diservo

15,00: visito de la urbo.

Dum la kongreso estos aranĝita ekspozicio pri esperanto-gazetoj, ĉar la temo de la kongreso estos « rigardo al la katolika kaj ĝenerala Esperanto-

gazetaro ». Bonvolu alporti sugestojn, ideojn kaj konstruajn Kritikojn.

Tagordo de la ĝenerala kunveno:

- 1) morala raporto
- 2) financa raporto
- 3) administraj aferoj: voĉdonadoj — ŝanĝo de la titolo de nia societo
- 4) debatoj:
 - a) temo de la kongreso
 - b) morala raporto
- 5) fiksado loko kaj tempo de la venontara kongreso
- 6) konkludoj.

III - INSTRUAJ AFEROJ

Frato Marmou vizitis sacerdoton en St-Louis d'Antin kaj ricevis bonan akcepton; la afero maturiĝas.

IV - INFORMADO

La agado de S-ro Bourdeaux jam ekportas fruktojn: aperis artikolo en la « Vie catholique »; ankaŭ tiu afero maturiĝas.

V - DIVERSAĴOJ

La Prezidanto legas salutleteron de W. Mudrak el Vieno. La kunveno finiĝas je la 17-a per « Patro Nia ».

Protokolis J. Vincent

LA LEGANTOJ SKRIBAS

Ĝis nun mi ne ricevis leterojn pri la « nova » EK. Sed mi atendas por, ke mi povu korekti la nemalmultajn erarojn kaj plenumi viajn dezirojn.

Franca Ligo de Katolikaj Esperantistoj.

KONGRESO DE LA KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ. EN ORLEANS, la 28-an de Marto 1971.

Protokolis F-ino Sylvie Bonnet.

La kunsido okazis en la domo St-AIGNAN en Orléans. La Prezidanto malfermas la kunvenon je la 9-a kaj duono, kaj legas la salutojn de diversaj personoj kiuj ne povas partopreni. Li anoncas la balotelekton de nova prezidanto, Pastro LONGONI, de LIMBIATE (Italio), kaj legas leteron esprimante la salutojn kaj bondezirojn por la sukceso kaj fruktodona agado de nia asocio.

Sinjoro Prezidanto Colas salutas la partoprenantojn per kelkaj vortoj, kaj legas la moralan raporton; li varme dankas Sinjorinon VINCENT kiu estas tre sindoneme kasistino de la Ligo, kaj ankaŭ redaktorino de nia ĉiutrimonata bulteno; li dankas ankaŭ Fraton MARMOU, kaj Prieuré St-Martin, kiuj estas niaj fidelaj persistoj kaj dissendistoj.

Li instigas ĉiujn anojn **LEGI LA ORGANON** de I.K.U.E., «**Espero Katolika**», kaj **ESPRIMI AL LA REDAKTORO ILIAN OPINION, NE AKRE, SED AMIKE KAJ FRATE**, se ili ne estas konsentantaj kun la aŭtoroj; kaj ankaŭ, sendi si mem artikolojn ne kritikajn sed konstruemajn; ni ne faru de E.K. polemikan organon!

Sinjorino VINCENT faras la finanĉan raporton por 1970; tiu konto estas aprobata.

Ŝi prezentas la kandidatojn por la renovigo de la nacia komitato: S-ino

VINCENT, S-roj VERON, TEXIER, MORIN, BARRIER. La nova kandidato estas S-ro Morin, juna Orleanano.

Oni ankaŭ proponis ŝanĝon de la titolo de nia « LIGO »:

FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO

Rezulto de la voĉdono por la Estraranoj:

S-ro VERON: 27 voĉoj	reelektita
S-ro BARRIER: 31 voĉoj	reelektita
S-ino VINCENT: 33 voĉoj	reelektita
S-ro MORIN: 26 voĉoj	elektita
S-ro TEXIER: 14 voĉoj	ne elektita

TEMO DE LA KONGRESO: LA GAZETARO.

Francaj katolikaj gazetoj: parolas pri esperanto se oni ofte skribas leterojn, informojn pri esperanto-movado, kaj se oni sendas artikolojn verkitaj laŭ la stilo de la gazeto, aŭ respondojn al malfavoraj aŭ mokemaj artikoloj.

ESPERO KATOLIKA: la kongreso petas de la redakcio de la revuo ke tiu estu verkita en pli frateca spirito. La artikoloj devas respeguli la katolikajn movadojn en la diversaj landoj, la esplorojn por pli perfekta kompreno de kristanoj inter si. La progreso de la reformoj enkondukitaj laŭ le im-

GRATULOJ

La 30-an de julio 1971-a, S-ro Alfredo GAMBERINI, Viale Oriani 38/3 Bologna, festis la 80-an datrevenon de sia naskiĝo samtempe kun la 20-a de sia esperantiĝo kaj la ricevon de la honorigo kiel kavaliro de ordeno de « Vittorio Veneto ».

S-ro Gamberini estas, kune kun la edzino Giuseppina, la « motoro » de la Bologna Esperanto-Grupo « Achille Tellini » kaj membro de la Itala Fervojista Esperanto-Asocio « I. F. E. A. » de longaj jaroj. Geedzoj Gamberini estas bone konataj en la fervojista medio ĉar ili partoprenis ofte al I.F.E.F.-Kongresoj.

Por festi digne sian 80-an jubileon, S-ro Gamberini oferis konsiderindan monsumon por la aktiveco de la Bologna Esperanto-Grupo « A. Tellini ». La Grupo mem solenis la daton per simpatia manifesacio kaj solene donacis al li memorŝildon.

pulso de « Vatikano 2-a » devas havisian lokon en la paĝoj de la revuo. Multaj ne aprobis la humorajn karikaturojn, kiuj ŝajnas atakoj kontraŭ la Eklezio mem al niaj nekatolikaj fratoj.

la 28-an de marto 1971.

EL LA MORALA RAPORTO POR LA JARO 1970

IKUE kaj ESPERO KATOLIKA

Kelkaj kritikoj estis faritaj al nia internacia organo. La karikaturoj, kaj la kritikaj artikoloj estas malmulte ŝatataj; mokaĵoj kontraŭ personoj kiuj reprezentas, antaŭ la okuloj de la multeco, la sanktan Eklezion, ŝajnas tute malindaj. Tiuj tute ne helpas la komprenon de la profunda senco de la kristana vivo en la korpo de la katolika Eklezio kaj malfortigas la dialogon kun aliaj familioj de kristanoj. Tamen, ni ŝatas la bonan lingvan redakcion de la plimulto de la tekstoj. Ni bedaŭras la malaperon de la pasinta presmaniero, kaj ŝatus retrovi ĝin. Multaj personoj diras aŭ skribas

al ni: ni ne plu legas E.K., la literoj estas tro malgrandaj do tro lacigaj...

EKUMENISMO. La rilatoj kun la nekatolikaj kristanoj devas esti amaj kaj fidaj; tamen ĉiu devas konservisian propran esperon ke la Sankta Spirito konas kaj inspiras la vojon al la Unueco.

Komuna preĝo, por pli da kompreno de la Dia Volo, simila volo por enkonduki la gracon en nian paganan mondon, per la regno de Paco, Amo kaj Justeco, sed la akcepto de la diferencoj, la toleremo al la diverseco de la disciplino, tio estas la unua paŝo al la plena repacigo inter separatataj fratoj. Kaj, se ni aprobas rekontojn kun ekzemple K.E.L.I., ni konsilas ke tiuj rekontoj ne fariĝu miksaĵon, sed dialogon en kiu ĉiu restas plene li-mem.

KONGRESOJ: F-ino BONNET partoprenis en la kongreso de Vieno; la katolikoj havis fakan kunvenon, kaj celebris Meson en Esperanto. Se multaj katolikoj estus en ĉiuj ĝeneralaj kongresoj, kaj kontaktus la katolikajn instancojn kaj movadojn, ili malfermus la pordon al la sindeteno de multaj...

FINO DE LA RAPORTO....

Komuna vespero kunigis la katolikojn kun la anoj de la kongreso pri amikeco; oni montris Fiat-filmon, rakontis anekdotojn, kantis, aŭkultis muzikon.

Dimanĉon posttagmeze celebris la diservon S-ro Goudé el Baugé, kiu lerta

adaptis al la gregoriaj melodioj Esperanto-vortojn. Dum kelkaj tuj forveturis hejmen, la restanta grupeto vizitis la belegan kaj imponan urbdomon, benesanca konstruaĵo, kaj la domo de Jeanne d'Arc, nun kulturdomo.

ĈU BALDAŬ NOVA SANKTULO NEDERLANDA?

Oficiale komencis la kanonika beatiga proceso de karmelitano Tito Brandsma, nederlanda ĵurnalisto. Li naskiĝis en la j. 1881. Dum la dua mondmilito li estis eklezia konsilanto de la nederlandaj katolikaj ĵurnalistoj. Li mortis la 26-an de Julio 1942 en la mondfama « kampo » de Dachau.

La jara abonkoto al nia revuo EK estas tri usonaj dolaroj (aŭ egalvalora mono). Vi povas sendi rekte al nia kasisto-sekretario, sin.ro Scherer, aŭ al via nacia peranto.